PILO-PRESS
Internacia
Informservo

N-ro 20/77 - 16 majo 1977
Aperas ĉiusemajne

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

# Eŭropa Esperanto-Kongreso 27-a - 31-a de majo 1977

## Programo

Kongresejo: Paderhalle, Paderborn

### Sabate, 28.5.77

| | |
|---|---|
| 10,00 - 11,00 h | Plackoncerto antaŭ la urbodomo de Paderborn<br>Akcepto ĉe la urbestro |
| 13,30 - 14,20 h | Malfermo de la kongreso |
| 14,30 - 17,00 h | Ebleco pri partopreno en aranĝo de Europa Klubo kun prelegoj pri la temoj "Ĉu subprivilegio per lingva diskriminacio estas la prezo por eŭropa unuiĝo"? |
| 17,00 - 18,00 h | Kunsido de GEI-kuratorio |
| 17,30 - 18,30 h | Kunveno pri Virina Agado |
| 17,30 - 19,00 h | Fakkunveno pri vortaro kaj lernolibro |
| 20,00 h | Kongresa balo kun tombolo |

### Dimanĉe, 29.5.77

| | |
|---|---|
| 9,00 - 10,00 h | Kunvenoj de KELI kaj IKUE |
| 10,00 h | Diservo subĉiela |
| 11,00 - 12,00 h | Publika informado pri Esperanto<br>Kunveno de Ludwig-Zamenhof-Gesellschaft |
| 12,00 - 13,00 h | Estrarkunsidoj, kunsido de AGEI/ILEI |
| 14,00 - 16,00 h | Jar(ĉef)kunvenoj de LEEN, LEA, GEA |
| 16,30 h | Filmoj kaj aliaj distraj prezentadoj |
| 20,00 h | Festvespero |

### Lunde, 30.5.77

| | |
|---|---|
| 9,00 - 13,30 h | Ekskurso al Hermann-monumento kaj Teutoburga Arbaro |
| 15,00 h | Kunsido pri rezolucio al Eŭropa Komisiono kaj Parlamento laŭ iniciato de EEC |
| 15,30 h | Diskuto pri diversaj temoj, i.a. pri la okazinta kaj okazontaj kongresoj |
| 20,00 h | Folklora vespero |

### Marde, 31.5.77

| | |
|---|---|
| 9,00 h | Tuttaga ekskurso al Weserbergland |

## Speciala poŝtgiĉeto

En la kongresejo funkcias poŝtgiĉeto kun speciala poŝtstampo sabate, 12,00 - 18,30 horo kaj dimanĉe, 10,00 - 14,00 horo.

## Librostando

Same en la kongreso funkcias librostando kaj Esperanto-ekspozicio.

Adreso de la LKK: D-ro Hans Kasselmann, Falkenweg 10, D-4790 Paderborn, Tel. (0 52 51) 6 19 58

## Esperanto ĉe la Viena Landpartitago

Vieno (pp) - La 7-an de majo 1977 okazis en Vieno la Socialista Partitago, Landa organizo Vieno, en kiu kunlaboris ankaŭ la Aŭstria Socialista Ligo Esperantista (ASLE). La sekretario de ASLE informis nin, ke dum tiu partitago estis pritraktataj tri proponoj de ASLE:

Propono 17

La Viena Landpartitago subtenas la klopodojn de la itala Socialdemokrata Partio enkonduki la internacian lingvon Esperanto kiel samrajtan laborlingvon ĉe la Socialista Internacio.

Tiu propono estis akceptita.

Propono 18

La Viena Landpartitago subtenas la sekvantan, unuanime akceptitan rezolucion de la Hispana Laborista Partio:

"Por ke ekestu vera interkompreniĝo kaj amikeco inter la laboristaro, estas necese ke la homoj povu ekpreni senperajn rilatojn. Pro tio oni rekomendas, ke ĉiuj Socialistaj Partioj de la tuta mondo akceptu Esperanton por la internaciaj rilatoj, kiel lingvon de la laboristaro."

Ĉi tiu propono estis transdonita al la Federacia Partia Estraro.

Propono 19

Por substreki nian neŭtralecan politikon, la gepatroj kaj gelernantoj ricevu la eblecon povi elekti ĉe la deviga lernfako "vivanta lingvo" inter la angla kaj la neŭtrala internacia lingvo Esperanto.

La Viena Landpartitago petas la Federacian Ministron por Instruado, entrepreni la koncernajn paŝojn.

Ankaŭ ĉi tiu propono estis transdonita al la Federacia Partia Estraro.

## Pri la Brita Esperanto-Kongreso

Hastings (pp/lgt) - La britan Esperanto-Kongreson, de la 8-a ĝis la 11-a de aprilo, partoprenis ĉ. 280 personoj el deko da landoj. La urbestro de Hastings, Konsilanto John Hodgson, faris sian salutparoladon en Esperanto, kaj la kanthoro "La majoretinoj de Hastings", kies emblemo estas la verda stelo, kantis la kanton "Sussex ĉe la mar'" en Esperanto. Krom administraciaj aferoj, la kunveno de BEA adoptis plurajn decidojn kaj rezoluciojn, i.a. ĝi postulas, ke BBC elsendu ĉiusemajnan kurson pri Esperanto.

## Pri Esperanto en Britio

Roubaix (pp/lgt) - Okaze de restado en Belgio William Auld, redaktoro de "La Brita Esperantisto" donis al la "Norda Gazeto" intervjuon. El tiu intervjuo ni citas tiun parton, kiu okupas sin pri "Esperanto en Britio".

Al la demando "Kion vi opinias pri Esperanto en Britio" William Auld diris:

"Esperanto en Britio estas miksaĵo de stagno kaj progreso. Apud la malgranda nombro de individuaj aktivuloj, okazas sukcesoj ĉe la Brita Parlamento (kun subteno de pli ol 50 parlamentanoj) kaj ĉe Universitataj Radiostacioj (Grupo Kvin)...."

## Bervala konversacio

VOLVO-posedantino deklaras al SABO-ŝoforo:

"Kiam mi vidas la munton de mia VOLVO, mi ne komprenas la klikojn antaŭ mia motoro. Ĝi estas tamen pli facile kluĉebla ol via SABO."

## Informkampanjo okaze de la Eŭropa Tago

München (pp) - Okaze la Eŭropa Tago 1977 la Eŭropa Unio München organizis varbkampanjon por la venontjaraj balotoj al la Eŭropa Parlamento. Esperanto-Klubo München uzis la eblecon, en tiu kadro, atentigi al la lingva problem en la Eŭropa Unio kaj pri la solvo, kiun Esperanto povus prezenti. La Klubo petis permeson por starigi informstandon en la kvartalo por piedirantoj kaj disdonis 4000 varbilojn kaj informilojn pri Esperanto al la pasantoj.

Pri la informkampanjo la organizanto Josef Weidacher opinias:

"Ni konstatis, ke pli ofte kaj plurloke tia informlaboro estus necesa. Montriĝis, ke multaj homoj ne scias kio estas Esperanto kaj kiel ĝi utilus al nia hodiaŭa mondo, precipe Eŭropa Unuiĝo.

Same surprizis nin, ke pli ol 10 personoj - bedaŭrinde nun maljunaj - sin prezentis kiel iamaj esperantistoj el la tempo post la unua mondmilito. Tiam Ligo de Nacioj en Ĝenevo favoris Esperanton kaj multaj homoj lernis tiun lingvon, esperante, ke tiu nun fariĝu komuna paca komprenigilo.

Estis la ŝtataj naciaj potencoj, kiuj denove trompis la esperojn de la homoj. Kaj hodiaŭ? "

**************************

## La semajna komentario de d-ro Alfred Macher
## Laŭ la Esperanto-Elsendoj de ORF 7/8 majo 1977

La aŭstria kanceliero Bruno Kreisky konferencis en Damasko kun la ŝtatestro kaj la ĉefministro de Sirio unue pri liverotaj dumil kvincent aŭtomobiloj de nia altrenoma aŭstra tipo por malfacila tereno, due pri la solvo de la proksimorienta krizo. Interparolis kun Bruno Kreisky pri tiu krizo ankaŭ la palestinano Yassir Arafat, surprize veninta al Damasko, ĉar li evidente pensas pri tiuj problemoj nun multe pli mature, pli prudente ol li kutimis antaŭe, la ŝancoj de bona solvo kreskis optimismige. Tamen bezoniĝas pacienco ĝis ĉiuj malhelpaĵoj estos superitaj - la interesoj en la Proksima Oriento estas ja tiel diversaj.

Bruno Kreisky vojaĝis ankaŭ al Kairo, kie Sadat nepre volis konsulti lin antaŭ sia renkonto kun prezidento Carter. Cetere: dum Carter volas tre multe redukti la liveradon de plutonio, okazas nun en la aŭstra urbo Salzburg granda internacia konferenco pri nukleareenergiaj demandoj, ĉefe pri kiel oni malhelpu la transiron de plutonio respektive de atomreaktoraj forĵetaĵoj en malĝustajn manojn.

La problemo de la granda internacia konferenco en Salzburg estas nur, ke ĝi nombras preskaŭ tiom da opinioj kiom da delegitoj.

Decidos, do, finfine, ankaŭ tiurilate, denove la politikistoj.

## Pri El Popola Ĉinio

La monata revuo "El Popola Ĉinio" nun denove atingis sian regulan aktualan eldonritmon. En ĉi tiuj tagoj alvenis el Pekino n-ro 5/1977, kiu estas ĉefe dediĉita al la temo "Ree Printempo de Literaturo kaj Arto". La numeroj 3 kaj 4 aperis kiel duobla numero. Intertempe ankaŭ aperis la lastaj du numeroj el la jaro 1976 kiel 11-12/76. Tiu numero en amplekso de 100 paĝoj estas unika dokumentado pri la vivo de Maŭ Zedong.

Aperis ankaŭ lasttempe 3 novaj infanlibretoj: Ruza Griza Lupego 0,80 DM, Liu Venhjue (rakonto pri juna pioniro) 1,50 GM, Ĉevalido transiras riveron 0,70 DM.

Pilo-Press, internacia informservo ĉiusemajna, jara abonkotizo 30,- GM

Bonvolu pagi al Ludwig Pickel, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1, Pĉk. Nürnberg 819 56 - 851




Kiu estas TRIKSINI ?

Kiu estas la pastro kun la sorĉbastono?

Eble vi jam konas lin aŭ vi aŭdis pri li!

Sed detalan aŭtentikan respondon vi trovos en Numero 1/1977 de Eŭropa Esperanto-Revuo.

En tutpaĝa ilustrita reportaĵo vi povos legi interesan malkaŝon pri la vivo kaj faro de TRIKSINI. Vi povas ankaŭ legi la daŭrigon pri la sekretoj de la magia bastono. (Vidu supre!)

En la sama numero vi povos legi jenajn kontribuaĵojn:

La germana dramaturgio sur polaj scenejoj; Beethoven mortis antaŭ 150 jaroj; Kontribuo al la filozofio de la pluvivado; La mondrekordo pri stulteco de E. Kishon; Atomaj centraloj naskas opozicion; Pri atomenergio; Svisaj spertoj de Marinko Gjivoje; Kial Italujo ne povas esti riĉa lando?
Krome vi trovos multajn informojn el la Esperanto-movado kaj pri la Esperanto-elsendoj.

N-ro 1/1977 aperos post kelkaj tagoj. Mendu ĝin jam nun! Prezo 2,- GM
Abonkotizo por 8 numeroj estas 16,-- GM.

Mendu ĉe Ludwig Pickel, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1,
Poŝtĉekkonto Nürnberg 819 56-851

******************

Prof. J. Rinĉin mortis

Laŭ la ĵusa Esperanto-Ekspreso de Pola Radio ni eksciis, ke mortis la kolono de la mongola Esperanto-movado, prof. J. Rinĉin, en la aĝo de 72 jaroj. Red. Jerzy Uspiensky en nekrolgo elstarigis la grandajn meritojn de la mortinto pri la disvastigo de Esperanto en Mongolio. Li esperantistiĝis en la jaro 1927 kaj organizis la unuajn Esperanto-kursojn en Ulan-Batoro en 1933. Ankaŭ post la dua mondmilito li revivigis Esperanto-vivon en tiu asia lando.

Iom da statistiko

La Esperanto-Redakcio de Pola Radio ricevis dum la monato aprilo 1977 entute 418 korespondaĵojn. La korespondaĵoj venis i.a. el jenaj landoj: Germana Demokratia Respubliko 74; Federacia Respubliko Germanujo 67; Hungarujo 61; Sovetunio 56; Ĉeĥoslovakio 52; Britujo 37; Francio 30; Svedio 10.
ORF Esperanto-Redakcio Wien laŭ statistiko farita de Pilo-Press ricevis en la unua kvarono de la jaro 1977 (1.1. - 30.3.77) 281 korespondaĵojn. La nombro da korespondaĵoj disdividiĝas laŭ jenaj landoj: Federacia Respubliko Germanio 74; Aŭstrio 44; Sovetunio 34; Hungario 22; Italio 16; Francio 13; Anglio 12; Ĉeĥoslovakio 10; Pollando 9; Finnlando 8; Germana Demokratia Respubliko 7; Hispanio 7; Nederlando 7; Norvegio 6; Svedio 4; Vatikano 3; Grekujo 2; Belgio 1; Jugoslavio 1; Malta 1.

Brilu la Eŭropa Esperanto-Kongreso! Tion deziris Barbara Pietrzak de Pola Radio en la Esperanto-anguleto kadre de la germanlingva programo dimanĉe, la 15-an de majo, en kiu ŝi citis la salutvorton de ĉefministro Heinz Kühn dediĉita al la Kongreso en Paderborn, citita laŭ Pilo-Press.

Pri aŭskultebleco: Nuntempe en Nürnberg estas preskaŭ ĉiuj E-elsendoj, riceveblaj en meza Eŭropo, bone aŭdeblaj. Varsovio 16,30 h 41 m, 22,30 h 200 m, 6,00 h 49 m. ORF Kurtondaj elsendoj sabate kaj dimanĉe bone aŭdebla; ORF Regional ĵaŭde, 18,50 h, meza ondo tre bone aŭdebla; Pekino 31 m vendrede (bone) kaj sabate tre bone aŭdebla. Zagrebo meza ondo ĉiam bone aŭdebla, same Svisa Kurtonda Radio, Vatikano, IBRA; Roma ne tre bone.